

Verschiĝnt maandelijks
Zestiende jaargang
Nummer 11 (185)
NOVEMBER 1949

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

PRAKTIKA PROPAGANDO.

La esperantistoj emas vivi en aparta mondeto, sed tia konduto finfine kaŭzas por la propagando katastrofan izolecon. Ni jam speritis ke la alfluo de gekursanoj, kvankam la ligaj sekcioj ne ŝparis monon por prepari vintro-kurson, restis tre modesta. Sed ni konsideru faktojn: ĉie ekzistas unuflanke kerno kie oni praktikas nian lingvon — aliflanke la amaso, kiu nur unu aŭ du fojojn jare aŭdas ion pri Esperanto, ĉu anoncon de kurso, ĉu komunikon pri festo aŭ kongreso. Kaj ĝuste al tiuj eksterstarantoj ni volas subite trudi nian internacian helplingvon.

Jam multaj propagandistoj tute ŝanĝis tiajn nemodernajn metodojn.

Estas ja logike ke oni unue dum monatoj, jes, dum jaroj, prilaboru la amason — pensu pri firmoj kiuj dum monatoj anoncas novan produkton per ĉiuj rimedoj, antaŭ ol ĝi aperas en la butikoj —.

La gazetar-servo, kia ni ĝin starigis, estas tial gravega helpo, kvankam ankoraŭ tro modesta. Sed ni profitu ĉiun okazon por altrudi la ekzistadon kaj uzadon de nia lingvo.

Konvinka pruvo por la praktika uzado de Esperanto estas nia biblioteko. Kaj ĉiutage aperas novaj libroj kaj broŝuroj. Kaj la redaktoroj estas superŝutitaj de libroj kaj petoj por recenzo ĉiuspecaj. Vere, tio necesas, ĉar estas ja la Esperanto-legantaro kiu aĉetas librojn. Sed imagu foje ke same iu nacia revuo ricevus ĉiujn eldonadojn, kun peto, en Esperanto, por recenzo? La impresado certe forta, kaj, daŭra!

Mi komprenas ke ne ĉiu nacia gazeto povas esti tiamaniere prilaborata. Sed U.E.A., pere de siaj ĉefdelegitoj, povus kunmeti liston de adresoj tutmondan, menciante per lando: adreson de grava ĝeneralsciencia revuo, de filologa revuo, de junulara revuo, de distraĵrevuo, kaj, se ĝi ekzistas, de regule aperanta libro-katalogo.

Eĉ la nura ekzistado de tia listo, kiu povus aperi en la jarlibro de U.E.A. estus por ĉiuj Esperantistoj kaj ne-esperantistoj jam tre interesa.

La eldonanto de iu libro facile deduktos al kiaj revuoj lia libro estus sendota, kaj la porrezenca kvanto limigos la lando-nombrojn. Kompreneble oni sendu ĉiam al tiu lando kie okazas propagandofensivo, kiel nun Islando.

G.M.

Cu

jam pripensis vi,
serioze pripensis:
viajn unuigajn vivtenas
kontribuoj viaj!
Tial tuj, nepre tuj, havigu
viajn kotizojn, viajn donacojn
al

V.E.B. - - - L.E.E.N.

Benelux al Helsingör (Danlando)



La plaĉa enhavo de la « mehlana » aŭtobuso ie en Germanujo, apud Hamburgo.

Vagonare aŭ jam aŭtobuse, la VEB-anoj atingis, foririnte la 15-7 vespere aŭtobuse el Roosendaal (Ned.) je la 3-a matene Utrecht-on, kie ili renkontis la LEEN-anojn, kiuj partoprenis la restadon en la dana paradizo Elsinora!

Ĉirkaŭ la 4-a matene, la tri NBM-aŭtobusoj startis, transportante pli ol 100 personojn, ek al Danlando. Tra Germanujo — unu « aŭtobuso » tamen tranoktis en Hamburgo — ili alvenis resp. en Kolding kaj Fredericia kie, glutinte tiom da kilometroj, ĉiuj dormegis...

Sed jam dimanĉmatene okazis, por unu aŭtobuso, la unua antaŭvidita ekskurso al la pentrindaj montetaj Schammlysbankuu (proksime al Kolding); posttagmeze rendezvo en Fredericia, de kie sur la ponton de la Lille Belt al la insulo Fyn kaj prame trans la Store Belt por atingi, la saman vesperon, Elsinoron.

Ree estis granda distanco, sed vere refreŝigis ĉiujn la alveno, la bongusta manĝo, la retrovo de la sindona amiko Friis (gvidanto de la E-ferio) kaj de tiom da kore karaj ĝeamikoj!

Kaj sin sekvis la ekskursoj por la tri aŭtobusoj: Kopenhago (kvarfoje) — ne estis forgesataj i.a. la urbodomo kaj la mond fama Tivoli —, Helsingör mem kun la hamleta kastelo, Kronborg; Hilleröd kaj la nekredblaj artrezoroj de Frederiksborg; Hornbaeck, la banurbeo, eĉ Hälsinborg en Svedlando kaj, ĉe la reveno, Silkeborg kun lagetoj kaj tiu Himmelbjerget, ktp.

Kaj ĉu do ne okazis io el Esperanta vidpunkto? Nu, nepre jes! Ĉiumatene, dum tuta semajno, ĉiuj kursoj: por komencantoj, por progresintoj, konversacia, historia, literatura ktp, kiujn gvidis gesanoj M. Haudebine (francino), Major (anglino), T. Morariu (rumano) Noll, I. Christensen kaj L. Friis (danoj).

Kaj vespere, prelegoj, dancado, promenadoj kaj « last but not least » Benelux-aranĝo kiu, malgraŭ malmulta ripetado, fariĝis sukceso per siaj sol-kaj ĥorkantoj, deklamoj, skeĉoj. Kaj kiom feliĉis la « dornaj » karavanestroj kiam « flor-um-is » ilin la junaj kaj belaj elsinoraj floroj!

Vere, ne nur la vespero, sed ankaŭ la vojaĝo mem pravis la realecon, la nigran vivon de Benelux!

Kiom diri pri la atmosfero? Vera internacieco, vera Esperantismo... Plene vortigi tion estas malfacile, ĉar ne nur la konversacioj, sed ankaŭ la manĝo, la dormado kaj eĉ la flirtado havis saman karakteron!

Kaj mi demandas: kiu el ni ne kunportis memorajojn pri dana gastamo, pri internacia amikeco, pri mirinda mondo kaj novaj same mirindaj homoj, eĉ pri angore konfirmitaj « dornaj »... memorajoj pri forviŝo de limoj (kvankam ne doganaj!) dank' al Esperanto?

Mi ne elokventos pri la rezultoj de nia karavano en Nederlando, sed jes ja pri la VEB-landeto! Same en Bruselo, kiel en Mehlano (mi ne forgesas Brugon!) mi rajtas konfirmi ke la Esperantistoj progresis kaj nun aspiras al tiaj « ekskursetoj », ke la aliaj nun grandparte lernas en vesperkursoj, komane aŭ ne, Esperanton, tiel ke multaj kaj tuj konvinkitaj adeptoj estis varbataj! Kaj ĉu tio ne estas praktika rezultato?



La nederlanda karavanestro R. Slot (dekstre) kaj edzino (meze).

Kaj ne la gvidantoj, sed ili jam planis por la venonta jaro... Ili flustras pri Kufstein en Tirolo, pri la UEA-Mond-Kongreso en Parizo, kelkaj pri reiro al Elsinora, kaj pri Dover en Anglujo!

Ili eble ne scias kiom ili postulas de la kompatindaj karavanestroj, kiuj ĉujare ekhavas iom pli da zorgoj kaj perdas iom pli da haroj... Sed tiuj estroj estas ja Esperantistoj, ili fidis la taŭgecon, la idealan karakteron, la organizemon kaj sentiman progresemon de la Esperantistaro kaj ankaŭ ili reiros al la ĝeamikoj, la konatoj, al la Esperantista popolo!

Nu jes, tiel, eble simple tiel, kvazaŭ lude, realiĝos la vivocelo de la kara Ludoviko, Lazaro Zamenhof!

T.V.G.

Wereldnuews

In Januari werd dit jaar een aanvang gemaakt met facultatief Esperanto-onderwijs op de Kweekschool te Deventer. In September, met de aanvang van het nieuwe leerjaar gaven 31 van de 33 leerlingen zich voor de nieuwe cursus op. Op de V.G.L.O.-school te Deventer wordt in alle klassen Esperanto onderwezen.

In verschillende fabrieken en bedrijven worden Esperanto-cursussen gegeven voor het personeel, o.a. bij Verkade en Pieter Schoen (Zaandam) en Ter Kuile (Enschede).

Het te Leiden verschijnende « Nederlands Talenblad » bevat naast teksten in het Frans, Duits, Engels, Spaans, Latijns en Russisch ook teksten in Esperanto.

De Algemene Vereniging van Leraren bij het Middelbaar Onderwijs heeft in haar Algemene Vergadering, in Augustus gehouden, met een grote meerderheid van stemmen het bestuursvoorstel aangenomen om de invoering van Esperanto als facultatief leervak bij het Middelbaar Onderwijs te ondersteunen.

Radio « Vaticaan » heeft bekend gemaakt, dat in het heilige jaar (1950) de programma's voor de feestelijkheden ook in het Esperanto zullen worden uitgezonden.

De Britse Minister van Onderwijs heeft twee inspecteurs als waarnemers naar het wereldcongres van esperantisten te Bournemouth gezonden. Zij woonden verschillende bijeenkomsten bij ten einde zich op de hoogte te stellen van het praktisch gebruik van Esperanto.

In « Het Schoolblad » van 3 Sept. lazen we een uitvoerig verslag van het op 18/22 Juli te Amsterdam gehouden internationale congres voor orthopaedagogiek. Enkele passages daaruit willen we onze lezers niet onthouden.

... Voertalen waren de Engelse en de Franse taal. Het Duits was toegestaan. Tolken waren niet aanwezig. Het was dan ook behoorlijk vermoeiend, al deze zittingen mee te maken... — In de praktijk is van het beantwoorden van vragen niet veel terecht gekomen. Het is nu eenmaal niet zo gemakkelijk, naar aanleiding van een pas gehoorde inleiding in een vreemde taal vragen te formuleren. In bepaalde gevallen verdween de spreker, voor de vraag ter tafel kon werden gebracht of was de overgebleven tijd totaal onvoldoende om haar te kunnen beantwoorden. Daardoor kreeg het congres over het algemeen iets mat...

Uit « Tijdschrift voor Buitengewoon Onderwijs », 29e Jaargang N° 9 citeren we over ditzelfde congres het volgende:

... En het was vooral na deze voordracht, dat velen het gemis voelden, dat het niet mogelijk was gebleken, de beschikking te krijgen over tolken. Menigeen, die zich verbeelde vrij aardig Frans te kunnen volgen, had na het beoog van Mad. Brosse die illusie verloren. Ook bij andere voordrachten deed zich het bezwaar van toch nog onvoldoende de taal meester te zijn, sterk gevoelen. Dit deed ook afbreuk aan het contact tussen buitenlanders en Nederlanders. Heel sterk werd dit wel gevoeld door hen, die internationale congressen hadden bijgewoond, waar Esperanto de algemene voertaal en het middel tot onderling contact was.

Het Braziliaans Instituut voor Geographie en Statistiek gebruikt al meer dan 10 jaar Esperanto in zijn correspondentie met het buitenland. Bovendien organiseert het Instituut verschillende Esperanto-cursussen voor zijn personeel.

Het ministerie van verkeer in Nieuw-Zeeland heeft filmstroken met Esperanto-tekst uitgegeven, om aan Nieuw-Zeeland in het buitenland meer bekendheid te geven. De aanvragen waren zo talrijk, dat het ministerie ze niet kon verwerken en de Esperanto-vereniging in Wellington moest verzoeken een oproep te plaatsen om de stroom van aanvragen te doen ophouden.

